

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



58a jaro n°1
januario - februario

Sonorilo


oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KIARAADSEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL DURWAEL IVO ISERENTANT ROGER

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

HONORA VICPREZIDANTINO

PLYSON J.

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DR. DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRAETEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE ROOVER R., LUCHEVAARTSTRAAT 28 BORGERHOUT

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRIJES TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

POŤTKONTO DE B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25

LA PETICIO

LABORO NE FINIĜIS

Respondante al peto de UNESCO, ke la agadoj de la neregistaraj organizaĵoj planitaj por 1965 etendiĝu ankaŭ al 1966, en ligo kun la 20-jara datreveno de la fondiĝo de UNESCO, la Estraro de UEA decidis daŭrigi la varbadon por la propono al la Unuiĝintaj Nacioj en la unua jarduono de 1966.

Ĉiuj jam scias, ke la rezultoj ĝis nun akiritaj estas plene kontentigaj el vidpunkto de la kolektivaj subskriboj, sed ke la nombro da individuaj subskriboj daŭre estas malpli granda ol tiu, kiun ni akiris okaze de la Peticio transdonita al la Unuiĝintaj Nacioj en 1950. La diferenco restas proksimume 200.000.

Se ni akiris en unu jaro pli ol 680.000 subskribojn, per plia streĉado de niaj fortoj ni certe kapablos atingi, se ne unu milionon, almenaŭ nombron pli altan ol tiu de la antaŭa petskribo, kiu estis 895.432, sed akirita en pluraj jaroj.

Ni diras « certe », kondiĉe ke tiuj, kiuj jam faris sian devon, daŭrigu sian laboron ankoraŭ dum kelka tempo. Sed ankaŭ kondiĉe ke la centoj da esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne faris ion, eĉ ne subskribis la proponon, plenumu sian plej elementan devon!

Ne povos okazi, ke unu sola samideano, apartenanta al loka grupo, nacia societo aŭ internacia organizaĵo ne estos subskribinta mem kaj kun siaj familianoj la Peticion, pri kiu tiom da esperantistoj fidis ke, se ĝi ne tuj helpos al la fina venko, ĝi tamen vekos grandan atenton kaj alproksimigos la tagon de la enkonduko de la internacia lingvo en la lernejojn.

Restas al ni ĉiuj ankoraŭ iom da tempo... tamen ne multe. Semajnoj, monatoj rapide forflugas. Estas la momento por diri : ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ ! ... Prenu, do, la folion, kiun vi eble posedas, aŭ petu tuj folion, kaj fine faru vian esperantistan devon !

Al tiuj, kiuj jam larĝe plenumis sian devon, ni diru simple : laŭdon kaj dankon kaj... daŭrigu !

M. Jaumotte

Estrarano de UEF pri landaj kaj fakaj asocioj

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

LA 39-a KONGRESO DE S.A.T.

okazos en SWANWICK, Derbyshire, Britio, de la 23a ĝis 30a de julio 1966.

Adreso de la Organiza Komitato: Ethel PRENT, 27 Argyle Road Cranbrook, ILFORD, Essex, Britio.

Kotizo: (por ne-membroj, ĝis la 31 marto), 4 dol. Post tiu dato: 4,50 dol. - Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kongres-kotizon.

LA 21-a KONGRESO DE SAT-AMIKARO

(por franc-lingvaj regionoj)

okazos en CENON-BORDOZO (Bordeaux), Francio, dum pasko: 9-12 aprilo 1966.

Adreso de la organiza Komitato:

Sekretario: L. ROBERT, Instruisto, Artiguos près Bordeaux, 33 TRESSES (Gironde).

Kasisto: Groupe Esperantiste Ouvrier de Bordeaux,
21 rue Matignon, Bordeaux, Poŝt-ĉekkonto 3477.71 Bordeaux.
Aliĝkosto: por SAT-Amikara membro: 10 fr.
por Gasto: 12 fr.
infano senpage

PROTESTOJ!

Envenis ĉe la redakcio pluraj protestletoj kontraŭ la nekrologo pri mortinta reĝino Elisabeth. (« Sonorilo » 57a j. Nr. 5 p. 58).

Iu esperantisto skribis ke la reĝino « kiu studis plurajn lingvojn, ĉe la Rusan », ne studis (aŭ ne sufiĉe) la Nederlandan kiu estas tamen la lingvo de la plimulto de ŝiaj subuloj.

Alia skribis ke eĉ la oficiala B.R.T., en vespera disaŭdigo, rekonis ke reĝino Elisabeth ne sufiĉe por la interakordigo de la du lingvaj popolpartoj en la Belga ŝtato.

PRONONCA SOLVO DE PROBLEMO

(Malplena gramatiko)

« ĉefa rimarko » (de aparta komisiono) estis, ke la membronombro ne montras tendencan al konsiderinda plialtiĝo »

D-ro I. Lapenna

(el revuo « Esperanto », jan. 1964)

Esperanto estas multfaceta,
facila kaj fasad-impona ;
la formo estas mirskeleta
kun karno glata, rozburgona ;
la vortoj estas sorĉopovaj,
klarigas ĉion nuancite
al fideluloj sencotrovaj,
se ili studas tom ŝvite.

*

* *

La numeralon « membro » prenu
kun « nombro », gravad por la grupoj,
ĝisfunde ilin do komprenu !
Se grupon konstistigus ŝtupoj,
sur ĉiu ŝtupo starus ano,
ĉu ni atingus turan alton ?
Ve, ofte tiun de kabano
de kiu oni riskus salton !
Sed « membronombro », prononcita
« membron(a)ombro », ĉe l'subiro
leviĝas, je homar-admiro,
kiel sputniko kaj sen dubo
ja universa iĝas grupo !
de l'suno, pro malpez' subita

TYNEVERUM

ĈEFURBO DE MALIA IMPERIO TROVITA EN GVINEO ?

Arĥeologoj el Gvineo kaj Pollando elterigis restaĵojn de granda urbo en Gvineo, proksime de la limo kun Malio. Ili opinias, ke ĝi estis eble la ĉefurbo de la Malia Imperio, kiun fondis en la 13-a jc. p.K. la mandingoj, nigrahaŭta popolo el Sudano. Ili povis rekonigi la komercajn centrojn kaj la arabajn kvartillojn, kaj trovis tri gisejojn, el kiuj unu eĉ bone konserviĝis. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

NOVA ELDONO DE LA BIBLIO

Ĉe la eldonejo Doubleday & Co., Nov-Jorko, ĝus aperis la unuaj du volumoj de nova anglalingva traduko de la Biblio. Ĝi rezultas el kunlaboro de eminentaj protestantaj, romkatolikaj kaj judaj kleruloj kaj estas influita de la arĥeologiaj kaj lingvistikaj eltrovoj de la pasintaj kvindek jaroj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

Plia malgranda noto pri la historio de la Esperanto-junularo en Belujo.

Al la artikolo kium ni publikigis pri tio en la pasinta numero de « Sonorilo » ni devas aldoni ke en la komenca periodo, i.a. en la okazigo de la unua internacia tendaro en Blankenberge kunhelpis grave s-ro J. Couwenberg, la filo de Dr. F. Couwenberg, profesoro, kaj kompetenta recenzanto de nia revuo. S-ro J. Couwenberg, cetere ankoraŭ partoprenas la agadon de la Bruĝa grupo « Paco kaj Justeco » kaj de ĝia junulara sekcio.



KARAVANO AL BUDAPEST

24.7.1966 — 13.8.1966

Würzburg, Nürnberg, Praha, Olomouc, Tatraska Lomnica Košice, Budapest :
tio estas la vojo de la foriro.

Wien, Salzburg, Berchtesgaden, Mittenwald, Garmisch, Bad Wimpfen, Oostende, tio estas la returnvojo.

(Detaloj en la antaŭa numero de SONORILO)

Unua listo de gepartoprenantoj :

Maertens Dirk, Sint-Kruis

Blondelle Paul, Sint-Kruis

S-ino Mention, Verviers

F-ino J. Chainneux, Verviers

F-ino Willems, Brugge

F-ino Begodt A., Merelbeke

F-ino Verbeke, Lille

Ges. Hérion, Verviers

F-ino Terryn J. (por la returnvojaĝo)

Kaj ankoraŭ 8 promesojn ; se mi por la momento devas rezervigi 10 lokojn por eventualaj kandidatoj de Britujo kaj Francujo, kie la anonco de la vojaĝo nun ĵus startis, tiam mi povas nur akcepti ankoraŭ 8 BEF-anojn. Tuja anonco estas do necesa.

Kondiĉoj : 15 tagoj tranoktado, manĝoj, vizitoj kaj ĉeesto al kulturaj vesperoj (laŭ la ebleco), vizoj, vojaĝoj en Hungarujo mem, komforta moderna aŭtoĉaro, trinkmono por la ŝoforo, unuaklasaj hoteloj kie ni tranoktos : 8000 F kaj nur 7000 F por edzino aŭ familiano de malpli ol 20 jaroj.

**Pro la internacieco de la gepartoprenantoj,
ni kongresas tri semajnojn en
Esperantujo.**

Enskribo : pagante 1000 F kaj la kongreskotizon al poŝtkonto 2914 29 de Maertens G., Pr. Leopoldstraat 51 Sint-Kruis.

Ni ankaŭ povas zorgi por la tranoktado en Budapeŝt.

BELGA ASOCIO DE ESPERANTO-GEINSTRUANTOJ

Fondiĝis en nia lando nova asocio sub tiu menciita nomo. Ĝi estos tute memstara sed havos apogon de nia Federacio. Estas absolute necese ke ĉiuj esperantistoj kiuj funkcias en la instruado aliĝu al ĝi. Antaŭ ol ni povos ion entrepreni ĉe oficialaj instancoj, ni devas disponi pri iom ampleksa reto da eventualaj kunlaborantoj. Ĝi nun redaktas statutojn kiuj permesos al ĝi havi oficialan karakteron. La sekretariino estas F-ino Champy ; Rue Etats-Tiers, 36 en Liège (telefono (04) 526667). Por Flandrujo validas la adreso de S-ro De Roover, Luchtvaartstraat 28, Borgerhout-Antwerpen (telef. (03) 3942.94. Kotizo ne ankoraŭ fiksita, sed estos minimuma.

ESPERANTO - KONGRESO

BUDAPEST

por via vojaĝo per aŭtomobilo

vagonaro

aviadilo

la vojaĝagentejo

BELGATOURIST

Parochiaanstraat 17 Brussel 1

17 rue des Parolssiens Bruxelles 1

Tel. 134332

povas helpi vin por la rezervigo de hoteloj

la trajnbiletoj

la aviadilbiletoj

la vizo

10 tagoj en Budapeŝt + aviadila vojaĝo = 6.520 Fr.

« Monda Kulturo » Somero 1965: de paĝo 57 ĝis 84. Eldonas UEA.
Redaktas Dr. A. Albault.

Bela, inda kultura revuo kiu povas esti komparata kun samspecaj nacilingvaj eldonaĵoj. Ĉi-foje ni ekscias ion pri la Uzbeka kulturo, nome pri tiea pentristo. Kiel vere internacia kaj mondampleksa estas nia kontakto ! Ni dankas tion al la Taŝkenta samideno, inĝeniero Petro Poliŝĉuk. Ni trovas ankaŭ tre « sinceran » recenzon pri « Tridek Rakontoj » fare de Cl. Piron. F. de Diego rakontas pri la vizito de Prof. Waringhien al la Kanariaj insuloj ... kaj rakontas pri si mem ! Hilda Dresen konatigas Estonajn geartistojn. Plie, traduko de parto de la teatraĵo « Naiva Edzinetto » de W. Wycherley (1640 ? - 1716). Tre interesa artikolo de Amadou Hampate Bâ pri « Poezio kaj religioj el Afriko ». Traduko de detektivrakonto de A. Conan Doyle. Ktp. Ktp.

Kiel « Stafeto » por siaj eldonaĵoj prave vokas : pluportu la torĉon !, tiel ankaŭ por tiu valora revuo la sama varma alvoko.

Svisa Esperanto-kalendaro.

Tiu murkalendaro havas belegajn vidaĵojn pri Svislando ; kaj sur ĉiu folio, dorsflanke, troviĝas iom da klarigo pri la bildoj. La prezo estas 5.50 Sv.Fr.

Mi rimarkigas ke la prezo estas multe pli malalta ol por similaj nacilingvaj kalendaroj.

« Bestkalendaro »

De tiu eldono nia redakcio ricevis provfoliojn. Ĝi estas grandformata kaj montras pentritajn bildojn de bestoj. Sur la dorsflanko estas klarigo en Germana kaj Esperanto lingvoj. 1 ekzemplero kostas 4 germ. markojn ; du kostas sep DM. Ankaŭ tiu-ĉi estas tre bela kaj ne multekosta. Kiel la antaŭa kalendaro, ankaŭ tiu estas havebla ĉe nia vendejo « Sonorilo » Kerkstraat 61, Brugge.

Ĉiu ja bezonas almenaŭ du kalendarojn. Do aĉetu ambaŭ !



KARAVANO AL BUDAPEST

24.7.1966 — 13.8.1966

Würzburg, Nürnberg, Praha, Olomouc, Tatranska Lomnica Košice, Budapest :
tio estas la vojo de la foriro.

Wien, Salzburg, Berchtesgaden, Mittenwald, Garmisch, Bad Wimpfen, Oost-
ende, tio estas la returnvojo.

(Detaloj en la antaŭa numero de SONORILO)

Unua listo de gepartoprenantoj :

Maertens Dirk, Sint-Kruis

Blondelle Paul, Sint-Kruis

S-ino Mentlon, Verviers

F-ino J. Chainneux, Verviers

F-ino Willems, Brugge

F-ino Begodt A., Merelbeke

F-ino Verbeke, Lille

Ges. Héron, Verviers

F-ino Terryn J. (por la returnvojaĝo)

Kaj ankoraŭ 8 promesojn ; se mi por la momento devas rezervigi 10 lokojn
por eventualaj kandidatoj de Britujo kaj Francujo, kie la anonco de la vojaĝo
nun ĵus startis, tiam mi povas nur akcepti ankoraŭ 8 BEF-anojn. Tuja anonco
estas do necesa.

Kondiĉoj : 15 tagoj tranoktado, manĝoj, vizitoj kaj ĉeesto al kulturaj ves-
peroj (laŭ la ebleco), vizoj, vojaĝoj en Hungarujo mem, komforta moderna aŭto-
ĉaro, trinkmono por la ŝoforo, unuaklasaj hoteloj kie ni tranoktos : 8000 F
kaj nur 7000 F por edzino aŭ familiano de malpli ol 20 jaroj.

**Pro la internacieco de la gepartoprenantoj,
ni kongresas tri semajnojn en**

Esperantujo.

Enskribo : pagante 1000 F kaj la kongreskotizon al poŝtkonto 2914 29 de
Maertens G., Pr. Leopoldstraat 51 Sint-Kruis.

Ni ankaŭ povas zorgi por la tranoktado en Budapest.

BELGA ASOCIO DE ESPERANTO-GEINSTRUANTOJ

Fondiĝis en nia lando nova asocio sub tiu menciita nomo. Ĝi estos
tute memstara sed havos apogon de nia Federacio. Estas absolute
necese ke ĉiuj esperantistoj kiuj funkcias en la instruado aliĝu al
ĝi. Antaŭ ol ni povos ion entrepreni ĉe oficialaj instancoj, ni devas
disponi pri iom ampleksa reto da eventualaj kunlaborantoj. Ĝi nun re-
daktas statutojn kiuj permesos al ĝi havi oficialan karakteron. La
sekretariino estas F-ino Champy ; Rue Etats-Tiers, 36 en Liège (tele-
fono (04) 526667). Por Flandrujo validas la adreso de S-ro De Roover,
Luchtvaartstraat 28, Borgerhout-Antwerpen (telef. (03) 3942.94.
Kotizo ne ankoraŭ fiksita, sed estos minimuma.

ESPERANTO - KONGRESO BUDAPEST

por via vojaĝo per aŭtomobilo

vagonaro

aviadilo

la vojaĝagentejo

BELGATOURIST

Parochiaanstraat 17 Brussel 1

17 rue des Paroissiens Bruxelles 1

Tel. 134332

povas helpi vin por la rezervigo de hoteloj

la trajnbiletot

la aviadilbiletot

la vizo

10 tagoj en Budapest + aviadila vojaĝo = 6.520 Fr.

« Monda Kulturo » Somero 1965: de paĝo 57 ĝis 84. Eldonas UEA.
Redaktas Dr. A. Albault.

Bela, inda kultura revuo kiu povas esti komparata kun samspecaj nacilingvaj
eldonaĵoj. Ĉi-foje ni ekscias ion pri la Uzbeka kulturo, nome pri tiea pentristo.
Kiel vere internacia kaj mondampleksa estas nia kontakto ! Ni dankas tion al
la Taŝkenta samideno, inĝeniero Petro Poliŝĉuk. Ni trovas ankaŭ tre « sinceran »
recenzon pri « Tridek Rakontoj » fare de Cl. Piron. F. de Diego rakontas pri la
vizito de Prof. Waringhien al la Kanariaj insuloj ... kaj rakontas pri si mem !
Hilda Dresen konatigas Estonajn geartistojn. Plie, traduko de parto de la tea-
traĵo « Naŭva Edzineto » de W. Wycherley (1640 ? - 1716). Tre interesa artikolo de
Amadou Hampate Bá pri « Poczio kaj religioj el Afriko ». Traduko de detektiv-
rakonto de A. Conan Doyle. Ktp. Ktp.

Kiel « Stafeto » por siaj eldonaĵoj prave vokas : pluportu la torĉon !, tiel ankaŭ
por tiu valora revuo la sama varma alvoko.

Svisa Esperanto-kalendaro.

Tiu murkalendaro havas belegajn vidaĵojn pri Svislando ; kaj sur ĉiu folio,
dorsflanke, troviĝas iom da klarigo pri la bildoj. La prezo estas 5.50 Sv.Fr.

Mi rimarkigas ke la prezo estas multe pli malalta ol por similaj nacilingvaj
kalendaroj.

« Bestkalendaro »

De tiu eldono nia redakcio ricevis provfolion. Ĝi estas grandformata kaj
montras pentritajn bildojn de bestoj. Sur la dorsflanko estas klarigo en Ger-
mana kaj Esperanto lingvoj. 1 ekzemplero kostas 4 germ. markojn ; du kostas
sep DM. Ankaŭ tiu-ĉi estas tre bela kaj ne multekosta. Kiel la antaŭa kalendaro,
ankaŭ tiu estas havebla ĉe nia vendejo « Sonorilo » Kerkstraat 61, Brugge.

Ĉiu ja bezonas almenaŭ du kalendarojn. Do aĉetu ambaŭ !

Belgia Esperanto-Federacio

48-a kongreso de B.E.F.
28, 29 & 30.5.1966

Loveno
pentekosto

La Lovenanoj elektis sloganon por la kongreso :

« Kontraŭ doloro helpas bona humoro ».

Tio ne signifas ke nur tiuj kun problemoj ktp venu al la kongreso ; sed ni certas ke la Lovenanoj klopodos forgesigi la pesimistajn ideojn dum la kelkaj tagoj ke ni, kongresanoj estos iliaj gastoj. Ne plu atendu : enskribu por la 48-a !

KONGRESEJO : Salons Georges, Hogeschoolplein

PROVIZORA PROGRAMO

Sabato 28.5.1966

- 14-a horo : malfermo de la akceptejo kaj de la kongresgicetoj.
- 16-a horo : kunsido de la administrantaro de BEF
- 17-a horo : vizito al la universitata Biblioteko.
- 19.30-a horo : oficiala malfermo : enkonduka parolado de la LKK-Prezidanto, D-ro Piot ; salutoj de la oficialaj reprezentantoj kaj de la grupoj de BEF. Festparolado de S-ro M. Jaumotte, ĝenerala Prezidanto ; poste distra vespero.

Dimanĉo 29.5.1966

- 9-a horo : malfermo de la gicetoj - Diservo.
- 10-a horo : kunsido de BEF - poste akcepto en la urbodomo.
- 12.30-a horo : fotografado.
- 15-a horo : promenado al la granda Beginejo ; vizito al pentraĵekspozicio ; eventuale : muzeo Vander Kelen.
- 19.30-a horo : Bankedo - Balo - Tombolo.

Lundo 30.5.1966

- 9-a horo : Ekskurso per aŭtoĉaro : Muzeo de Tervuren (vizito al la Kongo-Muzeo kun gvidisto), restado ĉe Zoete Waters.
- 13-a horo : Vizito al la abatejo de Park - Heverlee (Norbertanoj) ; Manĝeto en Wilsele.

LA LKK PETAS : bonvolu urĝe plenigi kaj sendi la enmetitan alĝilon al la indikita adreso, por certigi vian hotelreservigon.

NIA MENUO POR LA LOVENA KONGRESO

Aperitivo
Koktelo 1 glaso Blanc de Blanc
Kremsupo de Andaluzio
Charolais-Peco
Fleuriste
Terpomoj-fritbulkaj 2 glasoj da Sélection Georges
Kafo Minerala akvo
Malgrandaj dolĉaĵoj
Prezo : 200 F po persono, trinkaĵoj kaj servomono enkalkulitaj.



KIEN ?

AL LA ENSKRIBO

POR LA LOVENA

KONGRESSO !!

Astene
S-ro Vanderlinden Maurice
Antwerpen
Gesinjoroj Jaumotte Maurice
Gesinjoroj Balleux
S-ino Bernaerts
S-ino Brack
S-ino De Hondt
Gesinjoroj De Roover R.
S-ro Durwael Ivo
F-ino Enzlin
F-ino Geers
S-ino Jacobs
S-ino Lecat
Gesinjoroj Lernout
F-ino Maes
S-ino Merckx
S-ro Paesmans
F-ino Peeters
S-ro Schellekens
S-ino Stroobants A.
S-ro Van Humbeek
Gesinjoroj Vermuyten Hector
S-ro Verstraeten
S-ro Volders F.
Blankenberge
Gesinjoroj Couwenberg
S-ro Marmenout
F-ino Van Mullem
Aarschot
F-ino Claes Clara
F-ino Noyaert Germ.
F-ino Noyaert Maria
F-ino Verstrepren Rosa
Brugge
Gesinjoroj Couwenberg
S-ro Iserentant R.
S-ro Maertens
Gesinjoroj Poupeye
F-ino Van Parijs
F-ino Van Parys Is.

Gesinjoroj Verbeke
Bruselo
Gesinjoroj Fighiera
S-ino Opsomer
Gesinjoroj Plyson
Gesinjoroj Vyncke
Charleroi
S-ro De Kegel
Gent
F-ino Terrijn
Gesinjoroj Vandeveld
Herent
S-ro Cockx Marcel
Gesinjoroj Rasquin M.
Kessel-Lo
S-ro Jacobs G.
S-ro Van Bilsen
Kortrijk
Gesinjoroj De Brouwere
Eisden
S-ino Silhan José
Bonneville
Frato Victorianus
Liège
Gesinjoroj Denoel k. Filo
Leuven
S-ro Boving Hubert
Frato Arni Decorte
Pastro De Maeyer (†)
S-ro Frantzen Frans
S-ro Jacobs Ghislain
F-ino Henquinez M-Th.
S-ino Meurrens Anna
F-ino Meurrens Lona
D-ro Piot
S-ino Schayes Emilla
F-ino Saelemaekers M.
Verviers
F-ino Chaineux
F-ino Mention
Wijgmaal
S-ro De Vleeschouwer E.

KRUCVORTENIGMO

EDZPERANTO
KIO - K - - UEB
OKR - SIMBOL
NIG - POSED I
OGEMO - - TOG
MI MOZODORA
ILUZI - U - IC
I - LACVERKI
SE - MIELA - O
TRUBADORO J

Solvo de la problemo N° 14

Ensendis korektajn solvojn: el Antverpeno: S-ro. J. R. Van Eynde, S-ro. H. De Hondt, S-ino. J. De Hondt; el Bruĝo: S-ro. R. Iserentant; el Bruselo: F-ino. S. Opsumer, S-ino. E. Ernst, S-ino. Plyson; el Seraing: S-ino. Montelet-Soyeur.
Lotumado havigis la libropremion al S-ro. H. De Hondt.

Nova problemo povas provizore ne plu aperi pro manko de loko en nia nuntempe plimalgrandigita revuo. Ni konsilas al ĉiuj krucvortemuloj fari intensan, aŭ eĉ intencan, propagandon por varbi multajn novajn membrojn, tiele plibonigi la financojn de B.E.F. kaj konsekvence ebligi la plimultnombriĝon de la paĝoj de « Sonorilo ». Do ĝis rekonto esperable plej baldaŭ.

La « KRUCVORTANGULPRIZORGINTO »

(24-litera vorto signifanta: Ch. Poupeye.)

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

NI PETAS...

Kiu povas doni informojn pri la Nederlandlingva traduko de verkoj de Oscar Wilde, de George Bernard Shaw kaj de August Strindberg? Skribu kaj sciigu eventuale vendoproponojn al nia redakcio.

Alia samideano havas interesigon en L. Léau kaj L. Couturat: « Histoire de la Langue Universelle » eldono de Hachette en Paris. Por vendoproponoj skribu ankaŭ al la redakcio.

BELETRO

SED NE UNUALOKE

Julia Pióro, El Tero kaj Etero

Aleksandro Logvin, Sur la Vivovojo

Japana Kvodlibeto, kompilita de Tazuo Nakamura kaj Miyamoto Masao

Eld. Stafeto, La Laguna, Beletraj Kajeroj, n-roj 23 (1964), 24 (1964) kaj 25 (1965)

Senlace agadante por doni al ni interesajn legaĵojn, la eldonejo Stafeto samtempe provas prezenti vastan panoraman de la verkado en la internacia lingvo. Per la numeroj 23, 24 kaj 25 de siaj beletraj kajeroj ĝi rice sukcesis agrable surprizi nin, ne wiel pro ilia literatura valoro, sed — kio ne estas malpli grava! — precipe pro iu persona elemento, kiun ĉiu el ili enhavas kaj kiu estas speciale altira por ni.

Jen Julia Pióro. Kutime ne decas paroli pri virina aĝo, sed pri la aŭtoro de la rakontoj kaj fabeloj de « El Tero kaj Etero » mi ne povas ne fari escepton. Jam 54-jara ŝi ja estis, kiam en 1956 ŝi eklernis la internacian lingvon kaj, vidu, ne pli ol du jarojn poste ŝi komencis aperigi en esperantaj revuoj rakontojn kaj teatraĵojn, atestantajn preskaŭ ĉiuloke pri la freŝa kaj ankoraŭ arda juneco de ŝia animo. En la enkonduko de la libro, Baldur Ragnarsson do prave substrekas la « noblan persistemon » de tiu verkistino, « kiu en aĝo, kiam la plej multaj homoj fariĝas malinklinalaj al ĉio nova, lernas nian lingvon kaj tiel eniras kvazaŭ novan vivon, kie ŝi trovis sian propran signifon. » Samtempe ŝi donas stimulan ekzemplon al tiuj junuloj, kiuj sin sentas fordroni en indiferenton kaj eĉ malesperon, kiam, enirante la 30-an jaron, ili ankoraŭ ne trovis la ĝustan vivovojon.

En « El Tero kaj Etero » Julia Pióro kolektis ok rakontojn, el kiuj min precipe ravis la fabeloj. Plenaj de ekvilibraj kaj sagaj vivkonceptoj, ili sendube kreigis el tre realaj kaj kelkfoje eĉ amaraj vivospertoj. Sed, kontraŭe al multaj verkistoj, Julia Pióro ne alĝuas sian (kaj nian) nazon sur la kruelaĵojn kaj malpurajojn de la homa vivo. Ŝi rigardas (diras ŝi mem) la mondon kiel tra la vitro de aŭto aŭ trajno, « vitroj sur kiuj malrapide defluadis ŝnuretoj de pluv-perloj ». Kaj tiel, « en momento de silenta ripozo, malproksime de la tumulto, kiu karakterizas la urbojn », ŝi sukcesis krei por si mondon, « kiu havas realon kaj fantazion sur la sama nivelo ».

Mi opinias, ke pluraj naciaj aŭtoroj, pli kleraj, pli artismaj kaj pli alte lokitaj en la kultur-hierarkio ol Pióro, se ili konus ŝin, iom envidus ŝin pro tiu alta persona atingo. Sed ni ne faru tion. Ni enprofundiĝu en tiun duon-realisman, duonmagian mondon, ni admiru la delikatan virinan intuicion kaj nedetruieblan vivkuraĝon, kiuj estigis ĝin, kaj ni ne malpacientiĝu pro la (laŭ modernaj normoj) iom malrapida stilo. La horoj, pasintaj kun verkistino tiel humana kaj tiel simpatia kiel Julia Pióro, certe ne estas tempoperdo. Jam tro ofte pelas nin la moderna vivo, kaj, ĉiam forpelataj, ni ne plu aŭskultas la vortojn, kiujna ni devas aŭskulti kaj kiam ni ankoraŭ aŭskultas, ni ne plu faras tion kiel ni devas. Ankaŭ mi devas ĉi tie, pro manko de recenzo-spaco, abrupte ĝis-revidi al Julia Pióro kaj forrapidi al nova renkonto « sur la vivovojo », nome kun Aleksandro Logvin, ukraino.

Logvin, naskita en 1903, esperantiĝis dudekon da jaroj poste. Tiutempe « oni antaŭdiris al li karieron en la literaturo », rimarkigas F. Szilágyi, prezentante la aŭtoron al la legantaro. Sed pro grava malsano li baldaŭ ne povis plu aktive partopreni en nia movado. Kaj li izoligis. Tamen lu Muzo ne forlasis lin. En mal-feliĉo kaj korpomizero li daŭre esprimis la anim-sopirojn kaj elverŝis en poemojn sian nedetruieblan fidon al « feliĉo, vero, justo, libero kaj amikeco » (Szilágyi). Kvazaŭ por testi tiun fidon, la vivo donis al li novan, eĉ pli fortan baton. Venis la kruela epoko de la « granda silento » por la rusa esperantistaro. Logvin bone sentis, ke lia « internen turnita poezio », jam pro tiu kvalito mem, ne povis ne

esti suspektita al la okuloj de la tiamaj regantoj, malgraŭ la fakto, ke ĝi estis neniel demoraliza kaj malgraŭ tio (aŭ ĉu mi ĉitie diru: precipe pro tio?), ke ĝi nemiskomprenible proklamis la universalajn demokratiajn idealojn de libero, paco kaj homa interkompreniĝo.

Kion fari? Ne eblis remi kontraŭ la tro forta politika kurento. Eblis nur pacienci, longe pacienci, atendi alian temporon, kaj dume zorgi, ke la fruktoj de la junaĝo ne perdiĝu. Ĉi tion faris la patro de la poeto, kaŝante la poemaron en abelujo.

Alia tempo fine venis. Kaj en 1959 Logvin komencis duan periodon de poezikreado. Ĉi tie ni do trovas, en tute alia medio kaj en tute aliaj cirkonstancoj, la saman stimulan ekzemplon de vivkuraĝo, kiun mi jam reliefigis, priparolante la novelaron de Julia Piŭro. Prave do Stafeto publikigis poemkolekton de tiu malfeliĉa samideano, kiu pro malsano, vivozorgoj kaj politika miopio ne povis okupi en niaj vicoj la rangon, al kiu la laŭtalente estis destinita. Kaj des pli prave la eldonejo publikigis tiun poemkolekton, ke neniu poemo de Logvin troviĝas en la « Esperanta Antologio » de Auld.

En « Sur la Vivovojo » Logvin esprimis nur malmulte de tio, kion lia sentema animo spertis kaj suferis sub la vipobatoj de la sorto kaj de la homa miskompreno. Kiel bona esperantisto li ne povis nek rajtis malesperigi kaj ankoraŭ malpli malesperigi aliajn. Tial lia poemaro, parte klasikforma, parte verkita laŭ pli libera prosodio, kvankam ĝi estas « persona atesto » de liaj vivospertoj, tute ne malkovras al ni morozan poeton, priplorantan aŭ forrevaĉantan siajn tagojn en griza, polvoplena subtegmentejo, kiun li pompe nomus sia « ebura turo ». Logvin staras forte enradikiĝinta en la ĉiutaga vivo de la rusa popolo, li prikantas la belon de la patrujo kaj kiam li lasas ŝvebi sian rigardon al la malproksimo, tio estas por alporti saluton al la esperantistoj de Brazilo aŭ al Gagarin, Nikolajev kaj Popoviĉ alte en la kosmo. La esencon de sia poezio li klare formulis en la poemo « Sur la Vivovojo », dediĉita al la brazila verkistino Hedilho Neto :

Ni ne devas fuĝi al oazo —
luktu ni
por bona perspektiv' !
Bela estas
poezi-ekstazo,
sed pli bela estas
viva viv' !

Same trafte li esprimis la esencon de sia strebado en la poemo « Hirundo »:

Estu la fenestro
malfermita —
sen la ombro
de l'militŝirmil' !
Estu la ĉielo
ĝojinvita —
volas
homo
spiri
kun facil' !

Per tiuj mallongaj citaĵoj mi samtempe invitas miajn legantojn traĝui la tutan poemaron. — Szilágyi senteme parolas pri sia renkonto kun Logvin « sur la vivovojo ». Ankaŭ por mi tiu renkonto estis tre agrabla kaj fruktodona. Kaj mi ne dubas, ke ĝi estos tia por multaj.

Io, pri kio mi ankaŭ ne dubas, estas la literatura entuziasmo de Clelia Conterno Guglieminetto. Kaj tiun entuziasmon ŝi lasis abunde elŝpruci el sia koro, prezentante la lastan verkon, kiun mi devas priparoli : « Japana Kvodlibeto ». Feliĉaj japanoj, kiuj trovis tian enkondukantinn !

« Kvodlibeto », laŭ vortara difino, estas muzika aŭ literatura verko, konsistanta el pecoj de diversaj fontoj kaj karakteroj. Taŭga titolo por eta antologio

de literaturaĵoj, originale verkita en la internacia lingvo de japanaj aŭtoroj. Ĉu eble, ke ie en la mondo ekzistas samideano, kiu restas indiferenta por la ĉarmo de la orienta poezio? Cetere, la poezio okupas nur unu parton de la libro. Troviĝas en ĝi ankaŭ represo de la valora eseo de Kikunobu Matuba: « Kalocsay en traduko de orientaj poezioj »; unu filologia artikolo, unu teatraĵo kaj pluraj rakontoj kaj noveloj. Entute, ili formas kolekton, kiu laŭforme kaj laŭenhave, estis inda eniri la beletrajn kajerojn de Stafeto.

Memkomprenible, mi ne povas paroli pri mia lasta libro kiel pri la antaŭaj. Renkontiĝo kun aŭtor-kolektivo ja estas io tute alia ol renkontiĝo kun ĉiu aŭtoro individue. Jen kial ĉia antologio devas precipe valori pro la atmosfero, kiun la aŭtor-kolektivo sukcesis krei ĉirkaŭ si. Mi bedaŭras, ke mi ne povas diri, ke la atmosfero de « Japana Kvodlibeto » efikas sur min kiel refreŝiga bano. Sed tio verŝajne venas de la antaŭjuĝo, kun kiu mi akceptis la verkon, esperante enspiri el ĝi ebrigan parfumon, alportitan « sur flugiloj de facila vento » el la rafinita fabellando de miaj okcidentaj revoj. Bedaŭrinde por miaj revoj, sed eble feliĉe de alia vidpunkte, temas en la libro precipe pri tute alia oriento, mizera, kruela kaj... reala. Ni ekkonu ankaŭ tiun orienton. Kaj ni provu kompreni ĝin.

Mia recenzo finiĝos iom malĝoje. Sed ĝuste la konsideroj, kiuj kaŭzis tiun malĝojon, ankaŭ donas pli profundan sencon al la titolo, sub kiun mi lokis mian recenzon. Ĝi, kiu origine estis nura konstato, fariĝas kvazaŭ averto: beletro, sed ne unuavoke... Ĝi certe ne aludas ion duarangon. Mi deziras al la verkoj, kiujn mi priparolis, multajn legantojn.

Albert SAMYN.

Vilho Setälä; Ebbe Viborg kaj C. Stop-Bowitz: « Esperanto-Moderna Lingvo ». Eldonis: Fondumo Esperanto en Helsinko en 1965. Antaŭparolo de Prof. Dr. W.E. Collinson, 136 paĝoj. Prezo: 15 steloj.

La tri aŭtoroj volis verkon kiu estu la samspecaĵo de la konata « Simpozio », eldonita de « Stafeto », pri la problemato - ita. Tiuj tri ekzemplaj studoj tamen meritis pli ol tiel modestegan eldonon. Plie, la tre malgrandaj literoj ne faciligas la legadon ! La -atistoj prave atentigis pri mallogikajoj en la Zamenhofa uzo de la pasivaj participoj; kaj Jung montris tute trafajn ekzemplojn (Vidu « Heroldo » de 1-5-'61). Tial la (ne)recenzo de V. Sadler en « Esperanto » de aŭg. '65, p. 153, estas nenio alia ol fuĝo for de la problemato. Post ĉio kio aperis pri tio en nia « Sonorilo », ni ne plu ripetu. Nia starpunkto estas konata. En multaj kazoj oni povas egale bone uzi; estis ita, kaj: estis ata. En la aliaj kazoj ni sekvu la Zamenhofan uzon. Sed se tiamaniere ni esprimas sensencaĵojn (vidu menciitan numeron de « Heroldo »), ni uzu « estis -ita » nur en la senco de pluskvamperleto. Merito de tiu-ĉi libr(et)o estas ke ĝi komparas kun modernaj lingvoj. Mi tamen speciale atentigas pri forta argumento sur paĝoj 112 ĝis 115. Se ni komprenas la verbojn laŭ la aspekta sistemo, tiam la vortoj perdas sian signifon. Ni mem atentigis jam pri tio en nia recenzo pri la « Simpozio » (« Sonorilo »-marto 1962). Efektive, laŭ ni, vendi signifas: vendoproponi ĝis akcepto flanke de la alia partio. Alie oni ne povus paroli pri vendi. Tion la « aspektuloj » kontestas kiam ili pretendas ke « estis vendata » signifas ke la vendo ne ankoraŭ okazis. Sed nun C. Stop-Bowitz atentigas nin pri tiu gravega danĝero ke — en la « aspekta sistemo » — se « estis vendita » signifas ke la vendo efektive okazis, kaj se « estis vendata » signifas ke nur la vendo-propono okazis, ke tiam la verbo vendi havas fakte du signifojn ! Ĉu la -itistoj iam pensis pri tio? Mi scivolos kion ili respondos. Mi tre rekomendas la libron. Sed ĝi estas nur por personoj kiuj interesiĝas pri lingvistikaj problemoj.

Drs. F. ROOSE.

P.S. La fanatikulo(j) kiu(j) redaktis la ĵus aperintan katalogon U.E.A. de interesaj libroj, mencias la eldonon « Simpozio pri -ata, -ita » sed ne tiun-ĉi libron kiu defendas kontraŭan starpunkton.

BRUGA GRUPO ESPERANTISTA

Reĝa Societo.

Post la kongreso de Ostendo, al kies kunorganizo la grupo dediĉis siajn plej bonajn fortojn, la ĉiusemajnaj kunvenoj plue okazis kun variaj programoj. Kelkaj elstaraj punktoj estis: la 13an de julio: gvidata vizito de la pentra ekspozicio Gossaert (Mabuse) en la urba muzeo; la 21an de septembro: parolado de S-ro R. Lagast pri « Sonbenda registrado kaj reproduktado de sonoj » kun posta aŭdigo de belega registrita muziko stereofonia; la 12an de oktobro: malfermo de nova elementa kurso, sub gvidado de S-ro. Ch. Poupeye, kun bedaŭrinde tro malmultaj novaj lernantoj; la 14an de decembro, en ĉeesto de delegacio de la grupo « Paco kaj Justeco »: Zamenhof-festo. Paroladis; S-ro. Ch. Poupeye pri « Vivo kaj Verko de D-ro. Zamenhof », S-ro. Gr. Maertens pri « Aventuroj de Esperanto-pioniroj » kaj S-ro. R. Lagast pri « Sonbendregistrado ». Fine la 21an de decembro la grupanoj finis la jaron, kiel ili ĝin komencis, per agrabla vespermanĝo en fama restoracio de Oostkerke-Siphon.

La 4an de januaro okazis unua kunveno: festo de la Tri Reĝoj. Fabo enbakita en kuko indikis kiel reĝinon S-inon Gerda Millecarn, kiu elektis kiel reĝon S-ron. Marcel Poupeye. La 26an (esceptokaze merkredon) okazis la ĝenerala jarkunsido, kiu post la kutimaj raporto, reelektis la elirintan komitaton kun aldono de S-ro. Rob. Lagast, anstataŭe de S-ro. J. Eneman, kiu sin ne plu reprezentis.

Programo por estontaj kunvenoj

Ĉiumarde, je la 20a, en « Strijdershuis », Hallestraat, Tel. N° 34798 dum la unua horo: leciono de la elementa kurso; dum la dua horo: laŭ ĉi suba programo:

MARTO: 1-an: Legado de « Sonorilo »; 8-an: Kartludado; 15-an: Portretludado; 22-an: Parolado « Grekujo », diapozitivaj, F-ino. Y. Poupeye; 29-an: Filmvespero: S-ro. D. Demeulenaere.

APRILIO: 5-an: Kartludado; 12-an: Kantvespero; 19-an: Parolado « Skiferio en Svislando », diapozitivaj, F-ino. Y. Poupeye; 26-an: Konkursludado sub gvidado de S-ro. D. Demeulenaere.

GRUPA VIVADO

BRUGGE

« Paco kaj Justeco »

Post la somero ni havis re tre regulajn kunvenojn. Kelkajn mi volas speciale pritrakti. 24 okt. = tago de UNO. Nia prezidanto donis konferencon en kiu li klarigis la ekstreman komplikon de la multaj organizoj kiuj kune faras la UNOn. Li donis multajn detalojn pri ilia tasko, labormaniero, voĉdonado ktp. ktp. Ekz. li pritraktis la ĝeneralan kunvenon, la sekurecorganizon, la sekretariaton, la Intern. Mond-Fonduson, la Mond-San-Organizon, la UNESCO kaj aliajn. Li parolis ankaŭ pri konkretaj atingajtoj: kaj pri ilia historia ekesto. La 4an de nov. ni denove diskutis pri la ankaŭ komplika problemo de la neologismoj; okaze de la apero de broŝuro de F. Faulhaber. La 11an de nov. S-ro Muylle donis ege interesan konferencon pri la Sovjet-Unio, Afganistano kaj Irano; kun multaj diapozitivaj. La 9an de decembro nia membrino Madeleine De Ketelaere el Blankenberge paroladis pri sia vojaĝo al Israelo; ankaŭ kun multaj diaĵoj. La 14an dec. ni estis la gastoj de la alia Bruga grupo por kune memori Dr. Zamenhof. S-ro Poupeye paroladis, S-ro Lagasse aŭdigis belan muzikon kaj S-ro Maertens laŭtlegis partojn el la tre interesa verko de Dr. Privat: « Aventuroj de juna pioniro ». La tradicia Kristnaskofesto okazis la 8 januaro '66 en la hejmo de la prezidanto. Post bongusta manĝo kaj laŭcirkonstancia paroladeto de la prezidanto, sekvis nova « revuo » verkita tre sprite de S-ro An. Dumarey kaj ludita de la sama kun Gr. Maertens. La membroj kiuj ion « misfaris » en la jaro kaj eble esperis ke neniu scias tion, devis sperti kaj toleri ke la grupo havas mil okulojn ĉie, kaj ke ĝi « ŝparas » nenium. Post tio oni ankoraŭ iom laboris ... ĝis

la 5a h. ! Sed la gastigantino, S-ino H. De Kersgictor ricevis belegajn florojn de la grupo.

Brugge: la junulara grupo de « Paco kaj Justeco » (Sint-Kruis).

Tiu grupo daŭre regule kunvenas ĉiun duan dimanĉon matene, kie, post ekzercoj en la lingvo, sekvas diversaj ludoj.

Ĝi okazigis ankaŭ ekskurson al Izegem, Rocselare, per aŭtobuso, kie oni vizitis fabrikojn kaj ekzpozicion.

Kiel la plenkreskula grupo antaŭ jam multaj jaroj, nun ankaŭ la junula grupo okazigis specialan vesperon por la gepatroj. Unue, alparolado de S-ro F. Roose, poste cerbogiĝnastiko de S-ro A. Dumarey kaj poste dancado. Tiu unua provo havis relativan sukceson. Ĝi estos daŭrigata, sed oni bone priserĉos plej konvenan daton kaj oni bone organizos.

GRATULOJ

Ni ĵus ekscias ke S-ro Roger Jaumotte, ĝenerala sekretario de la Belga jurnalistaro, estas, e sia tagjurnalo « Lloyd Anversois », promociita kiel direktoro-adjunkto.

Ni gratulas la filon de nia ĝenerala Prezidanto, S-ro R. Jaumotte jam plurfoje funkciis kiel gazetara sekretario dum kongresoj; gratulojn ankaŭ por la edzino, filineto kaj gepatroj, ĉiuj membroj de nia federacio.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogiersstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

Ensendojn por la marta-aprila numero ni petas antaŭ la 10.3.1966

IN MEMORIAM

Mortis Oeverenda Pastro Jozef De Mayer. Ĉiuj anoj de la antaŭaj « Flandra Ligo Esperantista » kaj de « Seĝa Belga Ligo Esperantista » bone memoras lin. Li ofte partoprenis kongresojn kie li celebris la Sanktan Meson kaj predikis, kompreneble en Esperanto. Tuj post la dua mondmilito, kiam « Flandra Ligo » rekomencis la agadon, kaj kiam « Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj » decidis aliĝi al tiu ligo, Pastro de Mayer eniris niajn rangojn, kun speciala aprobo de liaj ekleziaj estroj. Liaj predikoj estis iam belegaj kaj signifoplenaj, tiel laŭ formo kiel laŭ enhavo. Kiel profesoro en la kolegio de Nijvel, li entuziasmigis multajn studentojn por la Esperanto-idealo. Ni perdis meritplenan kaj altstaran samedeanon. Al la funebranta familio ni prezentas niajn profundajn kondolencojn. Ni ĉiuj memoros lin, kaj la kristanoj inter ni preĝos por li.

manufakturaĵo ĉirkaŭ DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgio) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2
	Abdiĵstr 57
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9
	Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2